

La laŭ-tema esperanta-franca vortareto de Michel Duc Goninaz
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 542, 1974.02.27 & 03.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En kelkaj jaroj la franclingvanoj havis la privilegion povi aĉeti aron da novaj libroj, kiuj alportas veran revolucion en la esperanto-instruado. La *Laŭtema Esperanta-Franca Vortareto* de Michel Duc Goninaz, eldonita de Editions Ophrys en Gap en la kolekto *Labormetodo*, estas tutcerte posedinda libro ne nur por franclingvanoj.

A.- Tiu laŭ-tema vortareto estas bonvena, kiam oni deziras mem ellerni esperanton aŭ kiam oni alfrontas la taskon gvidi daŭrigan esperanto-kurson. Ĝia aŭtoro instruas esperanton en la Universitato de Aix-en-Provence (Sudfrancio). Fakte li metis je la dispono de la franclingvanoj verkon, kiu estas simila al tiuj, kiujn oni trovas por trastudi la fakajn vortaron de la ĉefaj fremdaj lingvoj.

Cl.- Laŭ averto de la aŭtoro tiu laŭtema vortareto neniel sin volas kompleta. Por la redaktado de la proponitaj vortlistoj kaj por ties francigo sinjoro Michel Duc Goninaz devis fari kelkajn arbitrajn elektojn. La rezulto de la laboro pravigas tiujn decidojn.

A.- La aŭtoro kontentiĝis doni nur la ĉefan signifon de la listigitaj vortoj. Kiuj deziras kontroli eblajn aliajn francajn tradukojn de la koncernaj vortoj, tiuj devas konsulti la fundamentajn vortarojn : *Grand dictionnaire espéranto-français*, *Plena Vortaro* kaj *Plena Vortaro Ilustrita*.

Cl.- Kiuj uzis la laŭteman vortareton de Duc Goninaz, tiuj povis konstati, ke la vort-elekto kaj la francaj tradukoj estas taŭgaj. Entute tiu libro estas tre utila lernolibro, kiun oni devus trovi en ĉiu daŭriga kurso. Bedaŭrinde, almenaŭ en Svislando, ni devas konstati, ke tiu laŭtema vortareto eldonita antaŭ tri jaroj ne ankoraŭ estas konata de la esperanto-instruantoj.

A.- Ni registris nur unu solan pres-eraron : *muskulo* anstataŭ *muskolo*, paĝo 29-a. Ni notis ĉe la aŭtoro preferon por la esperantaj formoj, kiam ili diferencas de la naturalismaj internaciaj. Ekzemple li proponas nur la vorton *agrokulturo* dum *Plena Ilustrita Vortaro* registras krome la formon *agrikulturo*.

Cl.- Ĉiu ĉapitro dividiĝas laŭ numerigitaj paragrafoj. La kapvortoj estas gvidilo pri la ĉefideo. Kiel ni jam diris, la elekto de la ĉefideoj kaj la listoj mem estas arbitraj. Sed la aŭtoro tamen mildigis tiun arbitrecon dank'al multaj notoj, kiuj proponas al ni aliajn ĉefideojn. Plursignifaj vortoj troviĝas en pluraj listoj. Ekzemple la vorto *korko* troviĝas kun la traduko « *liège* » en la ĉapitro *kreskaĵoj* kaj kun la traduko « *bouchon* » en la ĉapitro *manĝoj*.

A.- La vortoj troviĝas kun gramatika finaĵo, kiun ili tradicie havas en la fundamentaj vortaroj. Kaj la aŭtoro ne listigis plurfoje la saman vorton por doni la francajn tradukojn, kiujn ĝi akirus je ŝanĝo de la gramatika finaĵo. Li lasas la studentojn mem fari tiujn ekzercojn.

Cl.- Ankaŭ rilate al la kunmetaĵoj la aŭtoro restis je minimumo pravigebla. Tiuj intencaj forigoj de vortoj jam iom kompleksaj igas tiun laŭ-teman vortareton facile uzebla. Kompare al similaj nacilingvaj laŭtemaj vortaretoj, tiu de Duc Goninaz havas la avantaĝon ŝajni pli rapide asimilebla, kio ne estas malgranda kvalito.

A.- Enkonduke aŭ konklude al la proponitaj vortlistoj oni trovas frazarojn : ili estas proverboj ĝenerale zamenhofaj aŭ komunuzaj esprimoj. Jen utila enkonduko al la vort-uzo. Traduko de tiuj frazoj estas indikita, nur kiam ĝi ne estas mem evidenta por franclingvanoj.

Cl.- La enkonduka gramatika resumo estas tute tradicia, se oni esceptas kelkajn detaletojn. Inter ili ni menciuj la francan transskribon de la vokalo **e**, kiu estas signita per **è** (e accent grave), dum ĝenerale en la lernolibroj oni ankoraŭ trovas la erarigajn transskribojn **ê** (e accent circonflexe) aŭ **eê é** (e accent aigu). La **us**-modo estas prezentata de Duc Goninaz kiel « mode hypothétique », kio tute prave anstataŭas la erarigan vorton « conditionnel ». La franca modo « **conditionnel** » ne koincidas kun la esperanta **us**-modo. Ankaŭ rilate al la klarigoj de Duc Goninaz koncerne al la marko de la akuzativo ni esprimas nian konsenton.

Konklude al tiu rapida recenzo de la libro de Duc Goninaz *Laŭ-tema Esperanta-Franca Vortareto* aŭ *Vocabulaire espéranto* eldonita de *Editions Ophrys*, ni kuraĝigas ĉiujn esperanto-instruantojn akiri tiun verkon por unue riĉigi la propran vorttrezoron kaj poste por profitigi la gelernantojn de tiu progreso. Nefranclingvanoj povas uzi tiun libron serĉante en alia vortaro la sencon de la nekonataj vortoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Cl.aude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012